

Joseph Mohr,
Paca nokt'

tradukita de Joachim Gießner

Paca nokt', sankta hor',
malkviet' foras for.
Nur maldormas la sankta par',
knabo eta kun bukla harar'
dormu en ĉiela trankvil',
dormu en ĉiela trankvil'!

Paca nokt', sankta hor',
paŝtistar' en ador'.
Tra l'angela haleluja
al la mond' sonegas ja:
venis Krist', la Savant',
venis Krist', la Savant'.

Paca nokt', sankta hor',
dia fil', via kor'
donas amon dian sen fin',
de malbon' vi savis ja nin,
Krist', per via naskiĝ',
Krist', per via naskiĝ'.

*Traduko de la Germana poemo "Weihnachtslied" de JOSEPH MOHR (*1792 – †1848) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 – †2003-11-25).*

Arg-136-271 (2004-01-25 15:29:33)

La tradukinto, Joachim Giessner, estis ĝis 2002 la estro de Germana Fervojista Esperanto-Asocio. Li tradukis multajn kantojn en la Internacian Lingvon. Kelkaj troviĝas en aldono al la ttt-pagharo de GEA <http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html> kaj ankaŭ en la kantlibro "Mia kantaro" de Josef Schiffer, Wilstorfstr. 58, D-78050 Villingen-Schwenningen, tel. +49-(0)7721-508891, ret-poŝto: Josef.Schiffer@esperanto.de.

Joseph Mohr,
Kristnaska kanto

tradukita de N. N. 04

1. Paca nokt', sankta nokt'!
Mutas nun eĉ la vent'.
Jen maldormas nur amplena par';
ĉarma knabo kun bukla harar'.
Dormu plu en silent'!
Dormu plu en silent'!

2. Paca nokt', sankta nokt'!
Tra l' aer' vibras kant'.
Al paŝtistoj proklamas anĝel':
Li kondukos vin al la ĉiel',
Li, de l' mondo Savant',
Li, de l' mondo Savant'.

3. Paca nokt', sankta nokt'!
En la mond' Fil' de Di'!
Am' radias al ni el ĉi kor'.
Por elsavo nun sonas la hor':
Krist' naskiĝis por ni!
Krist' naskiĝis por ni!

*Traduko de la Germana poemo "Weihnachtslied" de JOSEPH MOHR (*1792 – †1848) en Esperanton de N. N. 04.*

Arg-136-270 (2012-07-26 15:23:29)

Tiu ĉi traduko de la konata germanalingva kristnaska kanto konsistas nur el la unua, sesa kaj dua strofoj (en tiu ĉi vico) de la origina sesstrofa teksto de la kanto. Vidu en http://www.stillenacht.info/de/stillenacht/d_noten.htm. Estas la tri strofoj, kiuj estas konataj kaj kutime kantataj. La Esperantigo de ĉiuj ses strofoj troviĝas en tiu ĉi poem-kolekto Argiop.blOrg.net sub la poem-titolo "Stille Nacht".